Oni dirus ke nur dum la lastaj kelkaj minutoj de la homa vivo surtera, la homo ekkonas la esencecon de sia planeda hejmo: ke la tero estas sfero, sen subteno en la spaco, izolita, kaj kompleta je si mem. Mapigante la nekonatajn regionojn kiuj restas sur la tero, ni efektive kompletigas la taskon de pli frua epoko, la granda epoko de geografia esplorado. Tiun epokon iniciatis Ulysses, kiu kuraĝis vojaĝi el la antikva meztera maro — la sala, fiŝplena, vinkolora maro kiun ni nomas la Mediteraneo — en la riveregan oceanon.

(*Daŭrigo sur sekvanta paĝo*)

MEMORNOTO

Samideano James Denson Sayers, unu el la plej fidelaj laborantoj por nia afero, mortis pace dum dormo je la 26a de decembro, 1957, en Lillie, Louisiana.

S-ano Sayers naskiĝis en Summerfield, Louisiana, 17 marto, 1888, studis ĉe Universitato Columbia, deĵoris kiel interpretisto por la usona armeo en Eŭropo, kie li helpis al la restarigo de la esperanta movado en Germanujo post la milito. Profesie verkisto, li verkis multajn romanojn pri la frua epoko en okcidenta Usono, kaj estas plej bone konata en Esperantujo pro sia "Invito al Ĉielo". Li estis fondinto kaj unua redaktoro de la *Revuo*.

"Jodoso" estis unu el la ĉefaj fondintoj de nia Ligo, kaj estis ĉiama batalanto por homaj libereco kaj interkompreno.

Nia batalinto ripozu pace.

La Homaro, la Tero kaj la Kosmo. *daŭr.*

La modernaj geofizikistoj precipe interesiĝas je nova speco de esplorado. Ili ek-lernas pri la supra atmosfero multe super la nivelo de ebla respiro. Ili sciolas pri la interno de la tero, la kruciblego kiun neniam vidos la homoj. Ili koncerniĝas pri la procedoj de movado kaj ŝanĝado, pri la ventoj de la aero, la flugoj de la maro, la tremoj de la solida tero, fluksoj de energio el la suno kaj el la ekstera spaco kiuj kaŭzas magnetajn maltrankvilaĵojn, kosmaj radioj kaj la aŭroro — mallonge, pri la majestaj kaj kompleksaj procedoj kiuj difinas la ĉirkaŭaĵon kaj de homoj kaj de ĉiuj aliaj vivaj estaĵoj.

Learn

ESPERANTO

by Correspondence

ESPERANTO-by-MAIL

123 East 35 Street Brooklyn 3, N. Y.

☆☆☆☆☆☆*****☆☆☆☆☆☆

KONU VIAJN GESAMIDEANOJN



La Familio Jungton

En Polujo, en 1904, amiko donis al S-ro Jungton Esperanto-ŝlosilon. Li portis ĝin hejmen kaj kun la edzino Esperantigis leteron al Francujo. Tiel komenciĝis multjaraj uzado kaj ĝuado de la lingvo.

En 1906, S-ro Jungton venis al Usono dum S-ino Jungton kaj la infanoj restis en Polujo. Ili korespondadis per Esperanto ĝis 1908, kiam la resto de la familio venis al la nova hejmlando. Esperanto multe helpis al la familianoj en la lernado de la angla lingvo.

En 1920 la familio transloĝiĝis al Milwaukee, kie S-ino Jungton faris paroladojn pri Esperanto en la muzea ĉambrego kaj instruis Esperanto-klasojn.

S-ro Jungton nun havas 87 jarojn, kaj S-ino Jungton 78, sed ili restas fervoraj gesamideanoj kaj esperas vivi ĝis vidi la oficialigon de Esperanto.

F-ino Emma Jungton, kiu reprezentis nian Ligon ĉe la UK en 1956, estas filino, kiu partoprenas la gepatran entuziasmon por la lingvo. Ŝi estas lingvo-instruistino ĉe mezlernejo en Milwaukee, kaj instruas Esperanto-klason tie.

Introduction to
ESPERANTO
THE UNIVERSAL LANGUAGE
The Third Edition . . . REVISED . . . Price \$2.00
Sent on Five Days FREE Examination!
BOX 792 • PLACERVILLE, CALIF.

PORTU LA VERDAN STELON

Trans la Lingvajn Barilojn

Francis kaj Bonnie Helmuth, el San Diego, komencis lerni Esperanton en Aprilo, 1955. Post jaro kaj duono ili entreprenis unujaran vojaĝon tra Eŭropo, kaj raportas al ni.

BARCELONA, HISPANUJO, 6 Dec., 1956— Estas ĉi tie du fratoj, malnovaj esperantistoj, kiuj faras multon por la Esperantomovado. Sebastia Alberich gvidas kurson por komencantoj en la socia kunveno "Casa Valencia". Li ankaŭ estis membro de la Internacia Lingva Akademio. Lia frato, Josefo Alberich, estas bona, fervora esperantisto. Ambaŭ akompanis nin por vidi la vidindaĵojn en la urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, kaj invitis nin al siaj hejmoj por vespermanĝi kaj interparoli kun iliaj familioj per Esperanto.

Por la unua fojo mi havis la okazon por renkonti blindan esperantiston. En Hispanujo estas malpermesate almozpeti kaj la blinduloj devas, anstataŭe, vendi loteriajn biletojn por vivteni sin. Ni renkontis Jorge Fernandez dum lia vendado proksime al la placo de Cataluna. S-ro Tomas Punet, ano de la grupo "Stelo de Paco", prezentis nin al Jorge, kaj dufoje ni havis bonajn interparolojn kun li ĉe la stratangulo. Li sciigis nin pri la blindula esperanta grupo kaj ankaŭ montris al ni esperantan gazeton presitan en Esperanto kaj brajlo. Li demandis al mi ĉu ekzistas blindula esperanta grupo en Usono, ĉar li volas korespondi kun la membroj, sed mi ne sciis.

Ni vizitis vojaĝoficejon por sciigi pri vojaĝo al la insulo Majorko, ĉar ni vidis reklamon en la Jarlibro pri ĉi tiu oficejo. Esperantisto estis en la oficejo, kaj li direktis nin al la ŝipkompania oficejo kaj ankaŭ donis al ni informojn pri Barcelona kaj Majorko.

Dum la pasinta merkreda vespero, post vizito al la esperanta grupo "Aurora", ni hazarde renkontis esperantiston en tramo. Li povas paroli la lingvon, sed kelkfoje li

devis serĉi vorton por esprimi liajn pensojn. Li klarigis al ni ke dum la du lastaj jaroj li ne havis tempon por studi aŭ praktiki la lingvon ĉar li devas labori en sapfabrikejo dekok horojn ĉiutage. Imagu, dekok horojn ĉiutage! Estas same ĉe multaj el la esperantistoj ĉi tie, ĉar la plimulto el ili devas labori pli ol dekdu horojn ĉiutage. Ĉi tiu okazo memorigis min pri kelkaj fojoj kiam mi aŭdis la vortojn, "Mi ne havas la tempon por studi aŭ praktiki Esperanton ĉar mi devas labori, ktp." de la komencantoj en Usono kiuj laboras nur ok horojn ĉiutage.

Unu el la plej viglaj, fervoraj kaj junaj esperantistoj en Barcelona estas Rafael Ayala. Kiam li sciigis pri nia alveno, li telefonis al ni ĉe la pensio por renkonto dum la sekvanta tago. S-ro Ayala estas korespondanto de mia kuzo, John O'Brien en San Diego, Kalifornio, kaj ni multe parolis pri S-ano O'Brien kaj San Diego. Tiun vesperon li kondukis nin al korbludado, kiun oni nomas "Jai Alai", kaj per Esperanto ni povis ĝui la ludon, ĉar S-ro Ayala klarigis al ni la regulojn.

Ĵaŭdo estis la tago de nia foriro el Barcelona, ŝipe, je la deka vespere. Je tiu vespero la familio de S-ano Ayala invitis nin al la hejmo por vespermanĝi. La manĝaĵoj estis bongustaj kaj la familio estis tre afabla, sed bedaŭrinde ni ne povis paroli hispane kaj ili ne povis paroli angle. La esperantisto do devis traduki por ni, kaj per Esperanto la familio demandis pri Kalifornio kaj San Diego, pri la vetero tie kaj pri la filmaj geaktoroj en Hollywood.

Post la vespermanĝo, per traduka helpo de S-ro Ayala, ni iris per taksio al la doko ĝustatempe por atingi la ŝipon al Majorko.

GRAVA ANONCO PRI LA KONGRESO DE ELNA

Nia ĉijara kongreso sendube okazos en San Diego, California, aŭ dum la unua semajnfino en julio, aŭ dum la dua.

La Revuo ĝis nun ne ricevis oficialan decidon de la Estraro. Tio aperos en la aprila numero. Sed por definitivaj kaj detalaj informoj oni skribu al S-ano Helmuth, kiu sendube estos Loka Kongresa Komitatestro. Vidu adreson sube.

1958 CONGRESS OF ELNA

The Review has not yet received the official report of the Executive Committee on plans for the 1958 Congress. However, it is now certain that the Congress will be held in San Diego, California, during either the first or second week of July. For official and detailed information, write to Executive Committee Member Helmuth.

Francis E. Helmuth,
P. O. Box 6215, San Diego 6, California.

DECIDO de la ESTRARO

La Estraro rajtigas la eldonon de 6-paĝa reklama folio pri Esperanto kaj ELNA, en 10,000 ekzempleroj, je kosto de proksimume \$160.

Bonvolu Skribi

Roman Taczewski, ul. Krasickiego 25, Myszkow, woj. Katowice, Pollando. Oficisto. Dez. kor. tutmonde.

Boian Conev, kvartalo Stalingrad, Svištov, Bulgario. Grupo dez. kor.

NI BEDAŬRE ANONCAS

ke malnova samideano, Frank W. Vedder, mortis en Miami, Florida, je la 14a de januaro.

TELEVIDO

(Vidu la februaron, junian kaj oktobran numerojn de la Revuo por 1957.)

Esperanto estas logika, sed ne simia lingvo, kaj tial ĝi ne estas devigita preni kripligitajn vortojn el aliaj lingvoj. Ankaŭ la 15a regulo de plena gramatiko de Esperanto tion ne postulas.

Prefikso *tele-* en Esperanto ne ekzistas, sed ĝi ekzistas en aliaj lingvoj kaj signifas, ke la koncerna ago estas longdistance plenumata kun helpo de transmissiilo. Ekzemple en la angla lingvo estas vortoj: teleautogram, teleautograph, telecast, teleceiver, telefilm, telegram, telegraph, telekinesis, telemeter, telepathy, telephone, telephoto, teleprinter, telescope, telescreen, telestation, teletyper, televiewer, television, k. a.

La vorto "televizio", kiun proponas s-ano Goldman, konsistas el du vortoj: "tele" kaj "vizio". "Visio" en latina lingvo signifas aperaĵon, imagon, en germana lingvo Vision signifas vidon de religiaj objektoj, personoj kaj agoj en sonĝo, en maldorma stato (halucinoj), en Esperanto "vizio" signifas imagatan objekton, kiun vidigas iluzio de la vidsento aŭ dia revelacio. Tial "televizio" estas malproksima *imagata* objekto.

La vorto "televideo", kiun proponas s-ano M. C. Butler, estas vido de malproksimaj *realaj* objektoj. Prof. G. Waringhien en plena vortaro de Esperanto donas "televidado".

Sekve s-ano Goldman tre eraras, proponante la tute netaŭgan vorton "televizio" anstataŭ la ĝusta vorto "televideo".

A. Holzhaus

MULTAJ DEZIRAS AĈETI la libron "Ĉirkaŭ la Mondon kun la Verda Stelo". Se vi havas ekzempleron por vendi, skribu al: Jos. R. Scherer, 1237 No. Alexandria Ave., Los Angeles 29, California, Usono. *Ne sendu la libron.*

Bonvolu Skribi

La *Revuo* presas senpage (sed foje mallongigas) korespondpetojn el aliaj landoj. Tiuj anoncoj aperas nur se, kaj kiam, konvenas al la redakcio (ĝis nun ni senprokraste presis ĉiujn, kies adresojn ni povis legi), kaj ili temu nur pri korespondado *en Esperanto*. Por certigi nepran aperon, oni pagu \$1 ĝis 4 paĝvastaj linioj. Se resendadreso ne estas legebla, ĝi estas nek presebla, nek presinda, do ne presota. **SKRIBU KLARE!**

MALLONGIGOJ: Dez., deziras; kor., korespondi; pk., poŝtkarto; bk., bildkarto; pm., poŝtmarko; gaz., gazeto; il., ilustrita; interŝ., interŝanĝi.

Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-kinoamatoroj, Budapeŝto XI, Puskas Ter 13, Hungarlando. Pri foto- kaj kinoamatorismo kaj aliaj temoj.

Lubov Tarczon, Szczecin, ul. Boh. Warszawy 5m4, Pollando. 30-jara oficistino, komencanto. Pri diversaj temoj.

Ludvík Zelezny, Havlíčkov Brod, Hulakovského ul. 716, Ĉeĥoslovakio. Dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj, interŝ. pk., pm., gaz. kvanton kontraŭ kvanto.

Vladimír Vurm, Dukelská 42, Ĉ. Budejovice, Ĉeĥoslovakio.

Josef Kubeček, Machov 87, Broumov, Ĉeĥoslovakio. 26-jara ŝoforo. Bk.

Mir. Lajkep, Bolzanova 5, Brno 18, Ĉeĥoslovakio. Studento.

Héctor Guillermo Espinosa, Manuel Porcel de Peralta 549 (Suc. 8), Buenos Aires, Argentino. 27-jara bankofeisto, edzo kun malgranda filo. Dez. kor., interŝ. pm., pk.

S-ro Tatsuo Imai, 354 Higashi-Ooizumi-machi, Nerima-ku, Tokio, Japanujo. 20-jara, komencanto, dez. kor. per bk.

S-ro Toshio Komatsubara, 5-5 Nagasaki, Toshima-ku, Tokio, Japanujo. 46-jara oficisto de ludilfabriko, komencanto, dez. kor. per bk. kun 16-17-jarulo, ĉar lia filo estas unuajara lernanto en teknika lernejo.

S-ro Yoshifuru Koakutsu, 59-2 Takinogawa, Kita-ku, Tokio, Japanujo. 40-jara oficisto de matfabriko. Dez. kor., interŝ. pm.

S-ro Tadashi Ayabe, 15-2 Toyotama-kami, Nerima-ku, Tokio, Japanujo. 20-jara barbiro, komencanto. Per bk.

S-ro Yoshinori Koakutsu, 3830 Z-chome, Minami-machi, Nerima-ku, Tokio, Japanujo. 14-jara liceano. Dez. kor., interŝ. pm.

S-ino Lea Bočkova, Kamenna 9a, Brno, Ĉeĥoslovakio. Pri Usono, filatelo, pm.

Adalberto Prezezdziek, Warszawa 31, Anielewicza 10 A, Pollando. 18-jara studento. Kun usonan(in)o pri skoltismo, filmo, fotografado. Interŝ. pk., gaz.

Antonin Hlaváček, Za vozovnou 256, Praha 6, Veleslavin, Ĉeĥoslovakio. Bk.

S-ro Yoshio Saiki, komyogi 972, Toide-machi, Toyama-ken, Japanujo. 17-jarulo. Kun studentoj en Usono.

M. Veg, Box 1960 R, G. P. O, Melbourne, Aŭstralio. Pm kaj unuataĝaj kovertoj.

Bulgario, Ruse, str. Georgi Dimitrov 122, Jordan Dimitrov. Oficisto, dez. kor. tutmonde pri diversaj aferoj. Dez. leterojn, fotojn, Esp-materialon por sia klaso por letervespero en marto.

C. Gangadhar, 8/213 Sir Bhalchandra Road, Bombay 19, Hindujo. Intereso pri usonaj filmgazetoj (*Photoplay*, ktp.).

P. M. Penevski, kv. Cernononevi, Dimitrovgrad, Bulgario. 44-jara laboristo. Dez. kor., interŝ. pm., gaz., ktp.

Esperanto in North America

On suggestion of President Doneis, *Esperanto en Norda Ameriko* appears in English, so that non-Esperantist readers may know what we are doing. Reader comment on this change and on other matters of editorial policy will be welcomed. What do you want in your magazine? How can we make it more useful to the Esperanto movement? Write in English or Esperanto to the editor: F. R. Carlson, 2116 N. 35 St., Seattle 3, Wash.

The U. S. won first place in the international contest of *Universala Esperanto-Asocio* for UEA memberships, with a high score of 159.97% of our quota.

BIRD TALKS ESPERANTO

Mrs. Tidwell, in Coolidge, Arizona, has a parrakeet, Patchee, which says clearly: "Patchee estas birdo - - - mi estas tre babilema - - - Patchee tro parolas." (Patchee is a bird. I am very talkative. Patchee talks too much.)

SAN FRANCISCO, CAL.,—Dirk M. Brink, former Executive Committee Chairman of ELNA, who labored so successfully in San Diego, has moved to San Francisco. Watch for a green star to light up the Golden Gate. (Dirk is working in a travel bureau. Consult him on your travel plans. P.O. Box 935, San Francisco 1. *Free adv.*)

San Francisco Esperantists held Open House on January 18 to tell our story to the public. Dirk's busy already!

SAN DIEGO, CAL.—San Diego High School again presents an evening class in Esperanto, starting January 29.

Local Esperantists observed Zamenhof Day with a banquet at the Streamliner Restaurant.

SACRAMENTO, CAL.—A Zamenhof Day banquet at the home of Mr. and Mrs. John Carpenter was topped off with Christmas carols (*Ed.* - in Esperanto, I hope) and Mr. Dillinger's new Esperanto card game. (Note the new address of the Club, p. 7.)

LOS ANGELES, CAL.—About 80 persons attended the Zamenhof Day banquet at Botwin's Cafe. (*Ed.* One report said "over 100", but we'll settle for the more conservative figure.) Chief speaker was Prof. E. Balech, President of the Argentine Esperanto League. Mr. Peterson showed color slides and recounted interesting experiences among Esperantists in many European countries. A collection was taken up to help in the erection of the new Zamenhof monument in Vienna.

SANTA MONICA, CAL.—A new class in Esperanto, starting January 9, has been announced by the Santa Monica YMCA.

BINGHAMTON, N. Y.—Mrs. Gerald Sherman, who is now teaching an evening class in Esperanto at Johnson City High School, reports increasing interest in the international language in this area. She has just ordered 6 gift subscriptions for schools and libraries. (*Ed.* Don't forget that any ELNA member can buy a gift subscription to the *Review* for a school or public library, 30¢ for one year.)

SEATTLE, WASH.—Beginning in February, club meetings will be held on the first and third Friday evenings of each month. Business sessions will be cut to 30 minutes, preceded by reports on Esperanto books and magazines and followed by general discussion. All discussions will be in Esperanto and when non-Esperantist visitors are present *the chairman will assign some member to serve as interpreter.*

TRY THIS IN YOUR GROUP!

RECORDINGS IN ESPERANTO —

Address: Esperanto Press, Oakville, Ontario, Canada.

Tape recordings now available:

1. La Nuntempa Esperanto-Literaturo, William Auld.

2. La Laboroj de UNESKO por Interkonigo de Popoloj, Ivo Lapenna.

3. Pri la Loire-Civilizacio, Prof. G. Waringhien.

4. Modernaj teknikaj revolucioj: atom-energio & aŭtomatigo, R. Watier.

5. Esperanto parts of "TEACH YOURSELF ESPERANTO.."

6. La Problemo de la Malsato en la Mondo, Dr. A. Albaut.

OTHER RECORDINGS WANTED!

Additional recordings will include radio broadcasts, speeches at congresses, club programs, etc., in Esperanto. You and your club can make good clear recordings to add to the collection. Write and ask for the INFORMILO and the MENDILO.

Any recorded tapes you send will be:

a. Returned after copying, *or*

b. returned with other recording on them, *or*

c. Kept by us and a similar recorded or blank tape returned to you, as you prefer.

Local non-Esperanto clubs may borrow a fifteen- or thirty-minute recording from the ELNA secretary, a talk on Esperanto, to be played at a meeting of their membership.

When sending tape recordings to Canada, always use the green customs sticker (Form 2976) on the outside. Get them at your postoffice. Under "contents" write "manuscript recording used tape being returned to Canadian owner," to avoid receiver having to pay customs duty on them.

Have you tried "voiceponding"? If you would like to try it, send us a tape and tell us about your recorder: the make, model, speeds, tracks, etc.

E N I G M O

al, al, al, co, da, da, da, di, el, eo, fa, fo, fo, gi, ĝo, ia, ia, id, il, il, ja, jo, ka, ka, ka, ko, le, li, lo, na, no, no, nu, oa, oj, or, or, pi, po, ra, ra, ra, ro, ro, ru, sa, se, su, ta, te, ti, to, to, ua, uj, un, un, zo

El la supraj duliteraj kunoj formu 29 kvarliterajn vortojn kun jenaj signifoj:

1. Plurala demonstrativa pronomo 2. Plata fiŝo 3. Verda ejo en dezerto 4. Tempo de jaro 5. Ne sama 6. Amata 7. Unuo de pezo 8. Mensa koncepto 9. Amfibia reptilio 10. Poseda pronomo 11. Ĉiela korpo 12. Kovri 13. Aranĝita en vicoj 14. Unuo de tempo 15. Ordono paroli pri io 16. Kion oni uzas por fari ion 17. Rapide kaj libere malsupreniri 18. Malgranda feo 19. Trinkaĵo 20. Tuko el lino 21. Granda kornhava besto 22. Ne bezonas flegiston 23. Oficiala regulo 24. Alta monto 25. Sen akvo 26. Antaŭ dua 27. Fruktu 28. 90-grada 29 Sen vesto.

La komencaj literoj de la vortoj formas malnovan proverbon.

Sendu solvojn al la redaktoro. Listo de solvintoj aperos en venonta numero. Neniu premio. Solvis la antaŭan enigmon:

Neniu. *Enigmo sendita de H. G. Borden*

Solvo de decembra enigmo:

1. viola, 2. cepo, 3. kobajo, 4. sino, 5. fetu, 6. gardo.

Konado de proverboj estas necesa por perfekta konado de la lingvo.

For One Dollar: an unbreakable micro-groove phonograph record on Esperanto pronunciation:

"DISKO POR AKIRI BONAN PRONONCON DE ESPERANTO" . . . 45 R.P.M. A mimeographed sheet gives you the words on the record to follow as you listen. Address your letter with a dollar bill to Andre Ribot, rue Paul Vergnes, Marmande, France.



OR RIMISTOJ

(POETOJ NE LEGU !)

ŜTONO EN LA KORO

Mi sidas en la kampo sola,
Sub mi la ŝtono malmola,
En la koro ankaŭ ŝtono,
Ene — neniam vivsprono.

En la koro

La doloro.

Kialo — knabino —

La perfidulino.

Stanislawa Walicki, Lodz, Pollando

FOR VIRINO . . .

Por kio ekzistas amo?

— Por homa ĝojo kaj . . . dramo.

Por kio vivas virino?

— Por via eko kaj . . . fino.

Por kio ŝi estas kreita?

— Por ke vi estu perdita.

For . . . la amo, for virino!

Belon, veron trovu en . . . vino.

Stanislawa Walicki, Lodz, Pollando

Ĉagrenanta Afero

de Sardelo

(el la plej alte klasifikitaj sekretoj de la scienco de la estonteco)

La sciencistoj jam diris, ke estus tre interese vidi la alian flankon de la luno. Tial ĉi tiu bilionulo decidis provizi la monon por konstrui raketon. Kostis multe da mono.

Fine, kiam ĉio estis preta kaj la riĉulo preskaŭ tute sen monero, li decidis mem iri. Tial li ĉirkaŭigis sin per fotografiloj de ĉiu speco, kaj magnetorubandoj por registri lian voĉon, kaj ankaŭ per radio-aparato kaj televido-aparato, ktp.

Venis la tago de foriro. Sonis granda bruoj. Sekvis longa silento dum tagoj. Nenio aperis per televido; neniu voĉo per radio. Foje oni aŭdis nur strangan ploretan. La mondo atendis senspire.

Post terura tempo la grandaj teleskopoj trovis la raketon revenanta. Ĝi alproksimiĝis. Baldaŭ ĝi malrapidis por eniri la atmosferon de la terglobo. Ĝi eksidis ĉe sia hejmloko.

Estis longa atendado sen signo de vivo. Fine la klapo de la aerseruro malfermiĝis. La iama bilionulo elvenis. Li tenis la manon ĉe la okuloj. Li tuj amare ekploris.

“Ho!” li plendis larme. “Ho tia afero! Tia ĉagreno! Tia embaraso! Vi ne povas kompreni! Sed mi estis tie. Mi vidis. Kaj mi juras al vi — la luno posedas nenan alian flankon!”

[Kara Redaktisto: Por via propra trankvileco de la menso, mi rapidas diri: La sciencistoj facile klarigis la aferon per esploro de la Einstein-a “teorio de relativismo”. Estas akra tordiĝo en la spaco de la “unuiĝa kampo” laŭ kiu veturadas la radioj de la suno, kiel ankaŭ laŭ kiu veturas la rebrilo de la radioj de sur la surfaco de la terglobo. Ĉe la angulo farita per tiu akra tordiĝo, la rebrilo de la tero kolizias kun la brilo de la suno. Pro la diversaj pozicioj aŭ situacioj de la terglobo relative al la suno ĉiujmonate la aperaĵo (ride nomita la luno) en la ĉielo prezentas plurajn fazojn. Sed ĉi tiu sciigo estas suprosekreta, do ne menciui ĝin krom Esperantuje. *Sardelo*]

Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in hats, *ĉ* as *ch* in church, *g* as in *go*, *ĝ* as *gem*, *ĥ* as *ch* in loch, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in azure, *s* as in *so*, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *ŝi*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

-us; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.

worth repeating...



The World
Needs
ESPERANTO
NOW

"The best thing that could happen in 1958 would be that the different peoples of the world learn to know, like and understand one another and make their peace."

Dr. Albert Szent-Gyorgyi, winner of Nobel Prize for medicine.

The great worldwide organization to promote Esperanto
for people of all nations, all religions, all political beliefs
IS



Universala Esperanto-Asocio

Representative in U. S. A.

D. E. Parrish, 328 West 46th St., Los Angeles 37, Calif.

Representative in Canada

W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., Toronto, Ont.

The ONLY North American organization affiliated with UEA is
Esperanto League for North America

Every member of the League is a member of UEA

JOIN NOW. Regular Member, \$3; Man and wife (each with Regular Member privileges, but receive only one copy of publications), \$4; Supporting Member, \$5; Patron, \$10; Life Member, \$50. Make checks payable to: Esperanto League for North America, Inc. Secretary: Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pennsylvania.